

AVENO #51 - Ekologio kaj Ekonomio - 2025

Por ECI (Europa civitana Iniciativo) necesas 1.000.000 da subskriboj el minimume 7 diversaj EU-landoj;

kolektenda ene de 12 monatoj. Tamen indas subskribi rapide, por atingi la kvanton sufiĉe frue.

Bazajn informojn en Esperanto pri ECI vi trovos en vikipedio - kaj de tie estas ligoj por legi detale en 18 lingvoj.

https://eo.wikipedia.org/wiki/E%C5%ADropa_civitana_iniciato

Kaj jen ĉio pri internaciaj tagoj, semajnoj, jaroj - en ĉiuj 6 UN-lingvoj:

<https://www.un.org/en/observances>

- - -

21a de Marto estas la Tago de la Arbaroj (FAO), kaj de Glaĉeroj (UNESCO)

21a de Marto estos unua monda internacia tago por la glaĉeroj
kaj 2025 estas la Jaro por protekti glaĉerojn

22-a de Marto estas la Tago de Akvo

22-a de Aprilo estas la Tago de la Tero.

05-a de Junio estas la Tago de la Naturmedio.

08-a de Junio estas la Tago de la Maroj.

26-a de Julio estas la Tago de Mangrovoj & de Esperanto

07-a de Septembro estas la Internacia Tago de Pura Aero kaj Blua Chielo.

26-a de Septembro Internacia Tago de Kontraŭ-Koncipado

30a de Septembro estas la Internacia Tago de Tradukado

https://eo.wikipedia.org/wiki/Internacia_tago_pri_tradukado

19a de Novembro estas la World Toilet Day (grund-akvo, kaj perdo de mineraloj (P, K, NOx) se oni forĵetas la fekaĵojn - de la homaro.

Kaj jen ĉio pri internaciaj tagoj, semajnoj, jaroj - en ĉiuj 6 UN-lingvoj:

<https://www.un.org/en/observances>

2022-12-31 Sur la Tero vivas 8 miljardoj da homoj !

2023-07-28 La homaro sur Tero jam foruzis tiom da resursoj kiom eblintus dum la tuta jaro por nia planedo

2024-08-01 Tago de Trouzado

<https://overshoot.footprintnetwork.org/>

2024-09-26 Tago de Koncipado

WHO kaj DSW rakontas, ke en Afriko ĉiu 10-a junulino naskas sian unuan idon antaŭ la aĝo de 18. Tio estas malbone por la junulino, kaj por la sano kaj por ŝia estonteco.

<https://www.dsw.org>

= = =

2025-03 Retejo de Naturamikaro en Esperanto

organizita de Herman Deceuninck
<https://eo-naturamikaro.webnode.nl/>
= =

2025-03 Amu Darja kaj Syr Darja - de glaĉeroj ĝis la Aral-Mar

Dokumenta vojaĝo de Cedric Gras el Francio pri la sorto de Aral, kaj ankaŭ diskutas eblajn solvojn.

La vojaĝo komenciĝas je Mujnak (kiu iam estis haveno-urbo je la Aral-Mar).

De tie kontraŭ la iama fluo de la rivero Amu Darja oni elprenas 50% por la kanala Kara Kum kiu fluas tra Turkmenio en la Kaspian Maron. Oni vidas Chiva [hiva] kaj Buchara, Urganĉ kaj Tadŝikio.

Multe da akvo iros al kamparoj de kotono en la dezerto Kyzyl Kum (nigra sablo), kaj je la suda flanko de la rivero troviĝas Afghanio.

La komenco de la Amu Darja estas la giganta Fedĉenko-Glaĉero - en alteco de 4 mil metroj.

dua parto:

Post la konstruo de la digo la akvo de la malgranda norda parto (ĉ. 20% de la iama Aral-Mar) la akvo de tiu lago altiĝis denove, fiŝoj kaj birdoj ktp. kaj marĉaj plantoj revenis.

Ankaŭ de la Syr Darja oni elprenas multe da akvo por kulturi: ĉi-kaze rizon; kiu ŝtelas multe de la akvo de la rivero. Krome la urboj Baikonur, Kyzyl Orda kaj la etendiĝanta Turkestan (artefarita Venecio !?) bezonas pli kaj pli da akvo. La verda Fergana-Valo estas granda agrikultura regiono. Ankaŭ tie kanalo elmetas multe da akvo. Venas Kirgizio de tie la glaĉeroj de Tian Shan montaro. Je la Naryn-rivero (la plej granda alfluo de la Syr Darja estas ankaŭ giganta barlago kun tre alta bar-digo (Topto Gul (?)), kiu produktas 40% da elektro por Kirgizio.

La elektro estas bezonata ĉefe dum la malvarmega vintro; tial en somero fluas malpli da akvo en la Syr Darja.

Krome estas tendenco ke dum la vintro venas malpli da neĝo. Finfine estas giganta orminejo kiu apartenas al la ŝtato kaj poluas la akvon.

La fonto de Naryn (la glaĉeroj) situas je alteco de ĉ. 4 mil metroj. Tie estas paŝtejo de Yakbovoj.

Evidente ankaŭ la klimata varmiĝo minacas la akvo-sistemon de Centra Azio. Pluvas malpli, temperaturoj altiĝas. Adicie la homoj bezonas pli kaj pli da akvo. Tio estas minaco ankaŭ por la Syr Darja.

Iam (ĝis la 70aj jaroj de la 20a jc-o) la granda Aral-Mar milidigis la klimaton kaj dum somero kaj dum vintro.

Dokumnta filmo 2-foje 50 minutoj - parolita en la franca kaj germana, krome subtitolita en la angla, itala, hispana kaj pola lingvoj.

Krom la specifaj temoj de akvo oni vidas historiajn urbojn kaj ege belajn pejzaĝojn kun ties specifa biosfero.

<https://www.arte.tv/de/videos/111305-001-A/aralsee-wo-ist-das-wasser-hin-1-2/>

La du filmoj estas videblaj tie ĝis 2025-07-22 ! Eble poste en Jutjubo ?

- - -

2025-03-06 la franca EPR kostis 7-oble; Svisio = atom-muzeo

Fine de decembro, la plej moderna atomcentralo de Francio komencis doni elektron al la reto - malfriiĝo de 12 jaroj.

Post la ekfunkciigo de la tria EPR-reaktoro ĉe la atomcentralo Flamanville, la Franca Revizora Kortumo publikigis raporton, kiu atestas en la plej bona kazo la "mezbona profito"

de la projekto. La franca energikompanio EDF, kiu estas sub ŝtata kontrolo, komencis konstruadon de la reaktoro en 2007. La originala plano estis ke ĝi aliru al la reto en 2012. Komence EDF taksis kostojn de ĉirkaŭ 3,3 miliardoj da eŭroj. La nun publikigita raporto metas la totalan koston de konstruado je 23,7 miliardoj da eŭroj, pli ol la 7-obla.

La profiteco de la reaktoro ankaŭ suferas pro la draste pliigitaj kostoj. EDF devus vendi la elektron de Flamanville 3 por pli ol 12 cendoj je kilovato horo por generi profiton de kvar procentoj dum 60-jara funkciada periodo.

Por komparo: La industria aĉetprezo por grandaj konsumantoj en Francio estas nuntempe 4,2 cendoj por kilovat-horo.

Pro "nova dinamiko" kaj la "amasiĝo de riskoj kaj limoj", la inspektistoj postulas tujan halton de ĉiuj planoj de ekspansio de nuklea energio de la franca prezidento Emmanuel Macron.

2025-03-23 Akuta malfunkciigo de la plej maljuna atomreaktoro - en Svisio

En ĉi-tiu informo ankaŭ estas menciita ke nuntempe en Beznau, Svisio, estas la plej aĝa de la ankoraŭ funkciantaj atomreaktoroj. La bloko 2 devis esti malŝaltita pro akuta problemo en la nokto de Dimanĉo 23a de Marto 2025. Oni diris ke estis malgrava afero.

Ĉiu atomreaktoro eligas daŭre radioaktivajn gasojn (Tricio kaj Kriptono-85); pro tio ĉiu atomreaktoro havas altan kamentubon kiu eligas tiujn gasojn en altan regionon por dilui tiun radioaktivecon.

<https://www.mitwelt.org/akw-kkw-beznau.html>

- - -

2025 SMR - malgranda modulara reaktoro

Laŭdire tio devus esti la malpli danĝeraj postsekvoj de nunaj atomreaktoroj, sed ili finfine estos malpli bonaj kompare kun la grandaj.

https://de.wikipedia.org/wiki/Small_Modular_Reactor

Tute alia principo sekvas la Likva-sala reaktoro. Kiu laŭdire estas sekura rilate eksplodo, kiel en Ĉernobil aŭ Fukushima. Mi ne povas prijuĝi ĉu ĝi estas sufiĉe sekura, inkluzive de la rubaĵo. Laŭ tio eblas produkti riĉigitan radkioaktivan materialon, kiu povus esti uzata por atombombo. Jen tre konciza informo en Esperanto.

https://eo.wikipedia.org/wiki/Fluidsala_reaktoro

Herman Deceuninck sendis tiun informon pri la funkciado de SMR al mi por diskuti. Fakte mi ĝis nun ne plene komprenis. Mi restas tre skeptika pri tiu tekniko.

<https://www.bright.nl/nieuws/1083659/kernenergie-kan-nederland-redden.html>

= =

2025-03-16/22 Mediteranea Esperanto-Seminario pri ekologio kaj klimato

Mi estis invitita al MES kiu regule okazas apud St. Raphael, oriente de Marsejlo, preskaŭ rekte je la bordo de la Mediteraneo.

Jen la ligilo: <https://provenco.esperanto-france.org/2025-03-15-22-Mediteranea>

Krom la kursoj por komencantoj kaj progresantoj okazis du kurs-serioj de po 6 sesioj, kun la celo kompreni iun temon kaj diskuti pri tio:

- pri diversaj epokoj de literaturo parolis Pawel Fischer-Kotowski,
- pri ekologio kaj klimato ĉi-foje ili invitis min.

La klimata trovarmiĝo nuntempe kaj tutmonde estas la plej urĝa temo: mi montris la influon de homaj agadoj - krome kio necesus kaj kio eblas por redukti la trovarmiĝon. Mi prezentis kelkajn ekologiajn temojn kiuj rilatas al la klimata varmiĝo, kaj ankaŭ al la minacata biodiverseco. El aliaj temoj (trafiko, loĝado, produktado, kulturo, militoj) mi elektis ĉi-lastan.

Kaj tute sube eta informo pri la rubaĵo de la kosmaj satelitoj ktp. kiun la homaro amase sendas en nian proksiman parton de la kosmo.

1. Agrikulturo: herbejoj kaj biosfero, utilo kaj minaco de pesticidoj, la rilato inter humuso kaj klimato, de praarbaroj al agroforsto.

2. Marĉoj: naturaj kondiĉoj kaj rilato kun la klimato, historiaj homaj utiligoj kaj kion oni proponas kunigi la bezonojn de la naturo kaj de la homaro.

3. Maroj: homara uzado de la maroj, ĉu estas limigoj de la „senlima maro“ ? kiel interagas la maroj kun la klimato ?

4. Plastaĵoj en la akvaroj, kaj en la natura medio: la videblaj kaj la nevideblaj minacoj - ekzemple de diversaj kemiaĵoj. Krome indus esplori la klimatan efikon de tiu tutmonda poluado.

5. Militoj kaj Klimato - ĉar la milito de Putin kontraŭ Ukrainio okazas en mia najbareco, mi elektis ĉi-tiun, sciante ke estas kelkaj aliaj (Palesteno & Israelo, Sudano) kaj kelkaj pli regionaj tensioj el kiuj povus iĝi milito: konciza historio de ĉ. 1000 ĝis 1991, kaj de tie detale ĝis la larĝa invado de rusiaj armeo en Ukrainion en 2022-02-24. La plena kunveno de UN decidis ke Rusio ne rajtis aserti ke temas pri MSO. La efiko de tiu largskala kaj longdaŭra milito al la monda klimato estas simile granda kiel tiu de tuta lando en amplekso de Nederlando !

- - -

2025-03-15 Rubaĵo en la ĉielo - klimataj kaj aliaj efikoj

dank' al la interesaj utilecoj de satelitoj ĉirkaŭantaj nian Teron, aŭ eĉ estis kvazaŭ fiksitaj, tiuj pli kaj pli multiĝas. Kaj same multiĝas la ne plu funkciantaj satelitoj.

Estas 3 gravaj temoj:

- luma poluado - jam nun ofte tiu nuboj de migrantaj punktetoj ĝenas astronomojn, kaj plantoj kiuj dependas de sun-lumo ricevas malpli da lumo (ĝis nun eble ne rimarkebla ?)

- klimata efiko - parte tiuj metalaj korpoj reflektas la lumon de la suno, kaj ĉi-kaze reduktas la varmiĝon - momente bone, sed post mil jaroj ??

- danĝero de kolisioj: en la orbito ili povas difekti funkciantajn satelitojn, kaj se ili finfine (post pluraj jaroj) tiom alproksimiĝas, ke ili falas al la teron, ili plejparte ardiĝas (??); tamen kelkaj grandaj pecoj atingas la teron kaj povas detruigi ion. Tial oni nun sekva ilin, kaj klopodas ke ili falos al regiono (prefere en la maro) kie ne loĝas homoj (pri bestoj oni ne pensas ĉi-kaze).

Jen koncize en Esperanto - de tie vi trovos pli detalan en via lingvo.

<https://eo.wikipedia.org/wiki/Kosmorubo>

kaj jen detala artikolo en la germana: [taz.de](https://www.taz.de) - ĉapitro: estonteco (2025-03-15).

= =

2025-01-20 Enurbaj arbaroj - bona ekzemplo en Francio

Mi aldonas, ke en mia urbo, La Ciotat en suda Francio ,37000 loĝantoj, la urbestro plantis "urban arbaron " kaj distribuis senpage 10.000 arbidojn al la loĝantoj : migdal-

cheriz-arbut-piz-arboj, kverkoj. Tiuj, kiuj ne havas ĝardenon tamen ricevis kaj plantos la 1an kaj 8an de Februaro en urba parko . Mi memorigas, ke ni plantis Esperanto-arbon , olivarbon en Aprilo.

(dankon por tiu informo al Renee Triolle)

= =

2025-03 Ĉu Eŭropo bezonas nuklean ŝirmon ?

Tiu temo iĝis pli akuta, unue ĉar la rusia prezidento Putin jam plurfoje menciis ke li povus uzi atomarmilojn se Ukrainio estos venkanta - do, cele al rehavi la nacian terenon laŭ la plurfoja garantio de Rusio, ekz-e okaze de la Manifesto de Budapesto 1994.

Kaj due ĉar la nova usona prezidento (Trump) tendencas neglekti la kunlaboron kadre de NATO.

Politikistoj en EU pripensas pli fortigi ne nur la defendajn fortojn sed ankaŭ la nuklean ŝirmon, kiu momente estas naciaj aferoj de Francio (ene de EU) kaj Granda Britio (ekstere de EU).

Jen - ĉi-sube - voĉoj el Japanio kiuj konsilas plene rezigni pri atomarmiloj. Ĉar la sekvoj de atom-milito estas ne-antaŭvideblaj. Ekzistas kalkuloj kiuj rakontos pri tutmonda katastrofo se pluraj atombomboj estos eksploditaj. Ja ekzistas t.n. taktikaj kaj strategiaj atombomboj - la duaj plurfoje pli fortaj ol tiu de Hiroshimo.

2011-03-15 Fukshima - daŭranta minaco

Civitana protesto kontraŭ la japana registaro kiu neglektas la sekurecon de la loĝantaro, kaj sekvas la intereson de la atomindustrio (TEPCO). Mi ricevis publikigitan 2 protestleterojn de Hidanren (asocio de viktimoj de Fukushima) kaj de homoj kiuj devis forlasi sian domon (en radianta zono), sed ne ricevis kompenson.

1945-08-06 Nuklea eksplodo detruas kaj mortigas grandan parton de Hiroshimo

Ekzistas rakonto, tradukita en Esperanton, de Tetsushi YONEZAWA - Hibakuŝo en Hiroshimo - pri la okazaĵo de la atombomba eksplodo super Hiroshimo, dum kiu li (11-jarulo) kun sia patrino troviĝis en tramo - lia bonŝanco. Tial li nur malsaniĝis - perdis la harojn, elvomis la tutan enhavon inkluzive de vermoj (tiam kutimaj parazitoj) - oni opiniis, ke eble tiuj vermoj enhavis plejparton de la radioaktiva materialo. Pro la eksplodo la fenestroj rompiĝis - kaŭzis severajn vundojn, ĉiuj eliris el la tramo, kaj poste la tramo ekbrulis. Samtempe ĉiuj lignaj domoj ekbrulis. Li vidis homojn kies vestaĵoj estis forbruligitaj. Li kun sia patrino estis trafitaj de pluvo kiu aspektis tute nigra kaj certe estis plena da radioaktiva materialo.. Ili finfine sukcesis reiri al la rifuĝejo en la montaro. Lia patrino mortis post 3 semajnoj; intertempe ŝi mamnutris la plej junan filinon, tiu mortis sep semajnojn post la patrino.

Lia detala rakonto estis eldonita kiel granda broŝuro (libro) „KINKAN Bald Tetsu“ - la fina alineo estas:

„ Nukleo (nukleaj teknikoj) ne povas kunekzisti kun ekologio sur la Tero. Mi rekonfirmas la decidon nuligi nukleajn armilojn, haltigi la nukleajn centralojn kaj neniam ŝanĝi la 'Pacan Konstitucion de Japanio'. Mi daŭre vokos por ĉi tiuj aferoj kaj daŭre agos.“

Mi jam skribis en AVENO 49 (de la jaro 2023): „Rusio minacas - Hiroshimo kaj la sekvoj ...“

https://www.verduloj.org/49/a49_eko.pdf

- - -

2025-01 ĝis 2025-03-25 Kameloj havas specialan immunsistemon

Esploristoj en Belgio trovis relative malgrandajn molekulojn en sango de kameloj, kiuj

funkcias kiel antikorpetoj. Ili povas ataki malsanigajn strukturojn en la ĉeloj. Tio klarigas kial kameloj estas pli sanaj ol aliaj bredatajn bestoj.

La doku montras la historion kaj la aktualan staton de tiu biologia sistemo, el kiu oni generas tutan medikamento-familion.

<https://www.arte.tv/de/videos/104392-000-A/heilung-durch-kamele-die-revolution-der-nanopartikel/>

= =

2025-01 Akademiano Sergeij Zimov esploras la permafroston en nord-orienta Siberio Laulonge de la rivero Kolyma survoje al la Arkta Maro. Degelanta subgrundo estas problema, ĉar ĝi eligas multe da metano, kiu estas pli forta forceja gaso.

Permafrostoj estas videblaj, dum somero la river-bordo larĝiĝas, ĉar la deklivo al la bordo donas la glacian grundon al la varma atmosfero. Por rebati la klimavarmiĝon li eksperimentas kun similaj bestoj kiuj iam estis antaŭ jarmiloj en tiu regiono. Ekzemple ĉevaloj, bubaloj kaj boacoj - prefere eĉ mamutoj. Ilia efiko okazas kiam ili dum somero reduktas la varmiĝon dum en vintro ili skrapas la neĝon por trovi herbojn - tiamaniere ili formetas la insulantan neĝon super la grundon; tiamaniere la subgrundo ĝis plia profundo glaciĝas. La herbivoroj ankaŭ reduktos la arbojn kiuj komenciĝas kreski pli norden, kie dum jarmiloj estis tundro.

<https://www.arte.tv/de/videos/078777-000-A/sibirien-die-helden-der-urzeit/>

- - -

2023 kontraste al tio en pli suda regiono de Tajgo oni batalas kontraŭ arbarfajroj La fajrobrigadistoj en la regiono de Krasnojarsk plendas ke oni forhakis tro grandajn regionojn, kaj tial la akvo mankas pli kaj pli, simile kiel en Amazonio. Arboj sekiĝas, kaj pli facile ekbrulas.

Aliflanke 2019 okazis fortaj inundoj de la lja en regiono proksime de Irkutsk.

<https://www.arte.tv/de/videos/091499-000-A/russland-feuer-und-fluten-in-sibirien-2019/>

- - -

2025-01 ĝis 2025-03-14 Walden - la vivo en la arbaroj - Henry David Thoreau

Kontraste al la vivo en kapitalisma civilizo (meze de la 19a jc.) li raportis pri siaj spertoj vivante en harmonio kun la naturo dum 3 jaroj en arbaro proksime de lago en norda Usono. Lia libro „Walden“ krom filozofio ankaŭ donas praktikajn informojn pri tia vivmaniero.

Dokuvideo en 6 lingvoj, parte nur subtitolita; 56 minutoj

<https://www.arte.tv/de/videos/102302-000-A/das-leben-in-den-waeldern/>

Pri tiu temo vi trovas ankaŭ aliajn videojn pri kiel vivi pli nature.

- - -

2025-01 ĝis 2026-10 Biosfero en la dezerto - daŭripova vivo en Meksiko

2 homoj en la meksika dezerto - esploras kaj eksperimentas kun multe da ĝojo, kiel eblas vivi tie dum 4 monatoj, uzante mar-akvon, diversajn teknikojn (hidroponik) kaj organismojn: Spirulina, insektoj ... kvalita analizado, mineraloj ... vitaminoj. Reciklado de akvo kaj organika materialo kiel baza sistemo. Necesas uzi (memprodukteblan) sapon kiu ne damaĝas al organismojn.

La celo: travivi sane kaj daŭrigeble

5 dokumentaj videoj (ĉiu 20 min) en la franca lingvo, subtitolita: de, en, es, it, pl

<https://www.arte.tv/fr/videos/110232-001-A/biosphere-du-desert-la-prepa-d-une-mission->

low-tech-1-5/

= =

2024-01-12 Rusio heredis poluado-neglekton de Sovetunio

en gazeto de 1992 - okaze de la Konferenco pri la Tutmonda Medio en Rio de Janeiro mi trovis du-paĝan mapon de iama Sovetunio, de la rusia instituto pri monitorado. Ĝi montras la multajn lokojn kie ankoraŭ rimarkeblis poluado pro la senzorga industrio kaj industria agrikulturo de Sovetunio. Ne forgesinde la radioaktive poluitajn regionojn ĉirkaŭ Ĉernobil (1986), Ĉeljabinsk (1957) kaj Semipalatinsk (testo de atombomboj).

Nun - denove - Rusio sendas ŝipojn, kiuj ne plu estas sufiĉe taŭgaj, plene da nafto sur la marojn. Aktuale Eventin (90.000 t da nafto) en la Balta Maro kiu ne plu funkciis, kaj ĝi dravis proksime de la insulo Rügen. Inertempe la havarita ŝipo estis trenita de 3 ŝipetoj al la haveno de Sassnitz, kie la maro estas malpli danĝera.

Se ĝi rompiĝus estus giganta ekologia katastrofo, kaj krome malebligus turismon dum pli ol unu jaro je la bordo de la Balta Maro.

Antaŭ unu jaro estis simile granda nafto-ŝipo Yannis P. (survoje al Hindio) kiu devis halti je la sama regiono. La nafto estis transdonita al alia ŝipo.

Oni rimarkas pli grandan eksporton de nafto trans la Balta Maro, ĉar kelkaj tuboj estis ŝtopitaj. Tiu vojo estas iom danĝera por tiom grandaj ŝipoj.

<https://www.tagesschau.de/inland/regional/mecklenburgvorpommern/tanker-ruegen-schattenflotte-100.html>

Kaj en Decembro surfundiĝis kaj rompiĝis Wolgoneft 239, dum la alia W. #212 nur alfundiĝis je la duoninsulo Taman je la markolo al la Azova Maro. Ambaŭ kune havis nur 9.200 t da nafto, tamen estas granda katastrofo. Ne estas trankviliga ke je Krimeo momente regas Rusio (kontraŭleĝa), ĉar la ekologia katastrofo ne nur estas loka afero. Tiom granda katastrofo de la du nafto-ŝipetoj montras kio okazus, se tiu granda Eventin (dekfoje pli granda) rompiĝus sur la Balta Maro.

<https://www.tagesschau.de/ausland/europa/oelpest-schwarzes-meer-krim-100.html>

--

2025-01-10 Varmigo de la klimato*

2024 la plej varma jaro historie. Ĉesu la "greenbashing"!

(kontraŭ verdula kalumnio)

Nun kiam 2024 superis la rekordon de 2023 kiel la plej varma jaro iam ajn, la "greenbashing" de tradiciaj politikaj familioj devus cedi la lokon por forta klimata agado.

La Servo pri Klimata Ŝanĝo de Koperniko (C3S) konfirmis, ke 2024 estis la plej varma jaro ekde kiam la rekordoj komenciĝis en 1850, kun la tutmonda averaĝa temperaturo unuafoje superante 1,5 °C super antaŭ-industriaj niveloj. Eŭropo spertis rekordajn somerajn temperaturojn, kun pli da varmeco-rilataj mortoj, sovaĝaj fajroj kaj pluvegoj, alportante mizeron al milionoj da homoj. Ciarán Cuffe, kunprezidanto de Eŭropa Verda Partio, kaj iama irlanda ministro pri klimato, diris: "Malgraŭ la ĉiam kreskanta pruvo kaj la klimataj katastrofoj kiuj trafis eŭropajn landojn, la Eŭropa Popola Partio gvidata de Manfred Weber daŭrigas sian greenbashing, atakante klimatajn politikojn por mallongperspektiva politika gajno kaj prokrastante la urĝe necesajn solvojn por bremsi la detruojn kaŭzita de

ekstremaj veteraj eventoj, centristaj kaj dekstraj partioj ne sukcesas protekti la homojn, hodiaŭ kaj por estontaj generacioj. Klimata justeco prokrastita estas klimata justeco rifuzita. La kunprezidanto de Eŭropa Verda Partio, Vula Tsetsi, aldonis: "Bone pensita klimata agado ankaŭ produktas multajn flankajn avantaĝojn: ni povas vidi, ke la renoviĝanta energio-revolucio jam disvastiĝas tra Eŭropo. Ni volas certigi, ke 'verdaj' rimedoj daŭre liveras avantaĝojn por la pli larĝa loĝantaro: ili kontribuas al pli malaltaj fakturoj, al deca loĝado kaj bonkvalitaj laborpostenoj. Ni vidis grandan progreson en la verda leĝfarado dum la lasta jardeko, kaj ni volas konservi tiun impeton en ĉi tiuj malfacilaj tempoj. Ĉi tio estas momento de elekto. Ĉu la gvidantoj de Eŭropo prenos decidajn agojn, aŭ ĉu ili permesos al la krizo plirapidiĝi?

Jen en la angla sur la retejo de la Eŭropaj Verdaj Partioj:

<https://europeangreens.eu/news/2024-hottest-year-time-to-stop-the-greenbashing/>

(dankon, laŭ artikolo de Michael Leibman)

*)

2025-01-12 Atribuada Scienco ligas efikojn al la kaŭzoj.

La militoj (RU > UA, Hamas > Israelo, Sudano) kiuj detruas amason da konstruaĵoj kaj eligas amasojn da fulgo, CO2 kaj diversaj venenaj gasoj kaŭzas grandan klimatan efikon. Oni kalkulis 1 miliono tunoj da CO2 dum unu jaro de la milito de RU > UA, kiu similas al la klimata efiko (pli-varmigo) de tuta Nederlando, kaj baldaŭ estas 3 jaroj. Oni ne forgesis la eligon da CO2 kiam oni rekonstruas tiom multajn detruitajn konstruaĵojn.

Jen pri la programo 'Copernicus' kiu monitoras per satelitoj kaj atribuas al la klimata efiko.

https://en.wikipedia.org/wiki/Copernicus_Programme

Pri tiu nova scienco: atribui mezuritajn datenojn de klimato-varmiĝo al ties kaŭzoj.

<https://www.reklim.de/>

= =

2025-01-09 Ekologiaj katastrofoj

Brulantaj arbaroj dum 2 tagoj (aŭ pli) je la rando de Los Angeles detruis 100 km²; forta ventego baris la helpon; pli ol 100 homoj mortis; multegaj perdis sian domon. Longdaŭra sekeco, kaj la tipo de la arbaroj (plejparte pinoj) helpis al tia katastrofo.

--

Uragano (Ciklono „Chido“) detruis grandan teritorion de la insulo Mayotte, Mozambiko kaj Malavio; pli ol 100 mortintoj, kaj pli ol 100.000 domoj estis detrutitaj.

Fortega tertremo (povo 7,1) detruis grandan regionon de Tibeto proksime de Monto Everest. ankaŭ tie mortis pli ol 100 homoj kaj multaj estis vunditaj, ĉar multaj domoj entute rompiĝis. Multe da helpo, tibetanoj plendas ke la registaro ne repektas la tibetan kulturon. Pli pri tio en la germana, angla kaj tibeta lingvoj:

<https://www.tibet-initiative.de/verheerendes-erdbeben-erschuettert-shigatse-humanitaere-und-politische-herausforderung-fuer-tibet/>

Komento AVE/mw: antaŭ pluraj jaroj mi legis ke dum pluraj jaroj la centra registaro detruigis malnovajn (malaltajn) domojn (Hu-Tong similaj), ĉar tiaj estas malfacile

kontroleblaj, kaj devigis la homojn loĝi en pli altaj domoj el peza materialo. Mi supozas ke tial la nombro de mortintoj estis tiom alta.

- - -

2025-01 Muskoj unu el la plej aĝa vivantaro de nia Tero

ili loĝas sur la tero dum centoj da milionoj da jaroj. Danke al unikaj biologiaj propraĵoj ili travivis longajn periodojn de sekeco, la formorton de specioj dum la pasintaj 400 milionoj da jaroj, same kiel klimatajn katastrofojn, vulkanajn erupciojn kaj eĉ radioaktivan poluadon.

Nur en la lastaj jardekoj multaj interesaj malkovroj estis faritaj pri ĉi tiu plantofamilio en la tuta mondo. Francaj esploristoj Bastien Nay kaj Emmanuel Baudouin malkovris molekulon kun la sama herbicida efiko kiel glifosato en disvastigita specio de musko. En Britio, polusa ekologiisto Peter Convey povis vivi muskon kiu estis kaptita en la antarkta permafrostoj dum 1,500 jaroj. Teamo de internacie agnoskitaj japanaj specialistoj mapis muskojn por ekscii kiel ili pluvis en la ekskludzonon de la Fukuŝima nuklea reaktoro. Kaj en Islando, biologo Gróa Ingimundardóttir esploris la musko-koloniigon sur dezerta islanda vulkana roko. En miksaĵo de sciencaj faktoj kaj filozofiaj konsideroj, la dokumenta video montras kiel muskoj estas parto de la regenera potenco de naturo. Jen kelkaj ekzemploj:

Tardigradoj vivas sur la muskoj. Ili rezistas plurjaran sekecon, dormis (?) 500 jarojn sub glaĉero.

Ili uzas siajn praĉelojn por vegetativa klonado.

Radioaktiveco de Hiroŝima estis kolektita de muskoj; ili regeneras okazitajn misfunkciojn. Ili montras interesan semado-teknikon. Oni supozas ke ili eĉ povus vivi sur la planedo Marso.

La sola danĝero estas venenoj kiel SO₂ - sulfuro dioksido - kio ofte produktiĝas je brulado de fosilia nafto.

Tial estas bona signo se je iu tereno estas densaj muskoj, kaj ankaŭ likenoj.

Homoj ja ĉiam demandas: "Por kio ili utilas?" Ekz-e oni trovis venenon Radulanin el la muskoj Radula, kiu havas similan efikon kiel Glifosat, sed estas malpli danĝera.

Finfine muskoj bone harmonias kun arboj, ĉar ili ofte vivas sur ilia ŝelo.

Videbla en la franca kaj germana, ĝis la 5a de Marto 2025, 52 minutoj

<https://www.arte.tv/de/videos/098859-000-A/moose-unscheinbare-helden/>

- - -

2024-01 dokumenta filmo pri Paul Watson - Protektanto de la Maro

<https://www.arte.tv/de/videos/115543-000-A/paul-watson-schuetzer-der-meere/>

- - -

2025-01 Antarkto degelas pli rapide

(entute 4 m pli altaj maroj, se la tuta glacio degelas. Nuntempe estas pli rapide ol antaŭe, Packeis formoviĝas > glacio el la montara regiono de Antarkto moviĝas pli rapide malsupren.

La mara fluo-ciklo estas sekvo de la t.n. "Thermohaline Zirkulation", 10 min.

<https://www.arte.tv/de/videos/113043-092-A/panik-in-der-antarktis/>

- - -

2025-01 Glaĉeroj tutmonde

ĝenerala dokumentado

Blanka neĝo havas altan 'Albedon' - do reflektivo de sunradioj.

Sed, krom la tutmonda varmiĝo, adicias la malpurigo, kiuj pli bone akumulas la sunenergion.

Tio ankaŭ gravas por Himalaya. La degelita akvo nutras la sudorientan Azion; de kio dependas 2 miliardoj da homoj.

Video 24 min, en 6 lingvoj: de, en, es,fr, it, pl; ĝis 2026-09-01

<https://www.arte.tv/de/videos/109816-007-A/was-wenn-die-gletscher-verschwinden/>

-- - komenco